

Literatura Mondo, 19-a parto : La Maskerado ĉirkaŭ la mondo ĉion pereigis :
Abortita projekto de Nova Krestomatio
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 645, 1976.02.18 & 21

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nur kun granda emocio oni povas legi la antaŭparolon al la jarkolekto 1938 de **Literatura Mondo**, Ĝi antaŭanoncas la militon, kiu neniigos la laboron komencitan en la jaro 1922. Aŭdu :

A.- « Eŭropo hodiaŭ similas al vulkano. Oni neniam scias, kiam ĝi erupcios. Tion sentas ankaŭ nia entrepreno, kiam ni vidas, ke niaj fidelaj abonantoj hezitas sendi sian abonon al Mez-Eŭropo, kie la situacio estas necerta kaj ŝancela. Unu post alia ni ricevas demandojn, ĉu ni ne timas la sekvon saman, kia trafis nian movadon en Aŭstrio ?

Cl.- « Ni devas diri, ke ne. La situacio en Hungarujo ne estas simila al tiu de Aŭstrio postmilita. Ni, hungaroj, fidas plene en la prudento de la registaro, kiu scias bone, kiaj teruraj konsekvencoj trafus nian malfeliĉan landon, se ĝi sekvus ekzemplojn najbarajn. Neniam ni okupiĝas pri aga politiko, sed nun ni opinias necese konatigi al niaj legantoj la traktadojn inter Hungarujo kaj la najbaraj landoj de la malgranda Antanto [Noto : La Malgranda Antanto estas alianco substribita ekde 1920 fare de la ekshabsburgaj ŝtatoj por la defendo de sia sendependeco kaj aŭtonomeco] pri pli intima kunlaboro. Tiuj traktadoj daŭras kaj iliaj sukcesoj ebligas la konservon de paca, evolukapabla atmosfero en Hungarujo. ...

A.- « En la intereso de niaj abonantoj kaj en la intereso de nia movado ni ne povas esti sufiĉe singardaj. Pro tio ni jam de post la jaro 1933 efektive estas tute aliformintaj nian entreprenon sur plene internacia bazo. Niaj kvazaŭ kunposedantoj kaj reprezentantoj en plej diversaj landoj de Eŭropo, inter ili en Nederlando, Svedujo, Svisujo, Estonio, ebligas al ni transmeti nian agadcentron en kiu ajn momento al kiu ajn taŭga lando, se tio montriĝas necesa. Niaj presejoj nun funkcias krom en Hungarujo ankaŭ en Italujo, Jugoslavujo, Latvio, Belgujo kaj ĉefe Hongkong, de kie la milita danĝero ŝajnas tute forpasinta.

Cl.- Niaj spertaj oficistoj estas diversnaciaj kaj diversreligiaj. Ni do povas garantii, ke iu ajn subita ŝanĝo en nia ĉefa sidloko ne influos pli la agadon de nia eldonejo, ol kaŭzi maksimume dusemajnan malfruon provizoran.

A.- Kiel vi vidas, ni faris ĉion home eblan por ke ni seninterrompe povu labori por la progresigo de nia literaturo sendepende de iu ajn ŝanĝo Eŭropa. Estas nun la vico al niaj fidelaj klientoj, ke ili ebligu tion al ni. Se niaj klientoj ektimas kaj panike retenas sian monon en la poŝo, aĉetas nek jam aperintajn librojn, nek sendas al ni siajn abonojn kutimajn kaj nepre por nia laboro necesajn, ne la Eŭropa situacio, sed ili mem paralizos la funkcion de la ... nun plej signifa Esperanto-eldonejo. ... »

Cl.- Tiu ĉi helpokrio vanis. La saman jaron jam silentis **Literatura Mondo**. Ĝis la lasta numero tiu ĉi revuo diskonigis projektojn, atestante ke tutan programon ĝi ankoraŭ havis antaŭ si.

A.- Ekzemple **Lingvo Libro**, la recenza suplemento al **Literatura Mondo**, anoncis en sia lastaperinta numero, 1938 Numero 1, per la plumo de la nelacigebla Kolomano Kalocsay, la naskiĝon de **Nova Krestomatio**. Ni ekzamenis la intencojn de Kalocsay.

Cl.- Unue Kalocsay prave memorigis la rolon de la **Fundamenta Krestomatio** : « Longtempe, efektive, la Fundamenta Krestomatio havis netakseblan valoron kiel garantio de lingva unueco kaj kiel modelo de stilo. Ĝi estis ne nur legaĵo kaj lingva konsilanto, ĝi estis – kaj estas – io pli, fundamenta ŝtono de nia literaturo. ...

A.- Sed intertempe pasis 35 jaroj, daŭrigas Kalocsay, kaj sur tiu fundamento konstruiĝis tuta palaco. Ankaŭ la lingvo riĉiĝis, evoluis, plipotenciĝis de tiam : ĝia esprimpovo pligrandiĝis, ĝia sintakso klariĝis kaj plifirmiĝis. Kaj kiel ajn grava estas la Fundamenta Krestomatio, ĝi iĝas, pli kaj pli, historia dokumento. Ĝi montras al ni ankoraŭ komencan, primitivan stadion de lingvo kaj literaturo. ...

Cl.- Estis do plene motivita la aperigo de verko, kiu havu pri nia nuna lingva posedaĵo la saman resuman signifon, kian la Fundamenta Krestomatio havas pri la tiama stato. », konkludas Kalocsay.

A.- Kun Emile Pfeffer kaj Grenkamp-Kornfeld, Kalocsay dum jaroj amasigis vere interesan kaj valoran materialon. La tasko de la aŭtoro de la Plena Gramatiko estis poste kribri kaj kompletigi tiun ĉi materialon. Jen kiel Kalocsay priskribas sian laboron :

Cl.- « Dum tiu laboro mi pli kaj pli konvinkiĝis, ke tia Krestomatio ne povas konsisti nur en la sensistema vicigo de interesa lego-materialo : ĝi devas esti alia ol simpla Legolibro aŭ Antologio. Por distingiĝi de ĉi tiuj, ĝi devas havi ian gvidlinion. Kaj ĉi tiun gvidlinion mi kredis trovi en la kompleto : la libro devas enhavi ion, laŭeble plej karakterizan, de ĉiu aŭtoro, kiu per valoraj verkoj partoprenis en la konstruo de nia literaturo : ĝi devas montri la plenan internaciecon de nia beletro, enhavante ion tradukitan el ĉiuj lingvoj, kies trezoroj estas interpretitaj en nia lingvo ; ĝi devas montri la lingvistan laboron de ĉiuj, kiuj per valora laboro kontribuis al la esperantologio ; ĝi devas respeguli ankaŭ nian movadon. Ĝi do devas ilustri per verkoj nian literaturhistorion, ĝis nun ne verkitan, sed ĝerme jam enhavatan de la Enciklopedio de Esperanto, sub diversaj gvidvortoj. Nur tiamaniere la verko havos ankaŭ tiun pedagogian signifon, kiun pretendas la titolo Krestomatio. »

A.- Ankoraŭ nun, 40 jarojn post tiu ĉi anonc-artikolo, ni atendas la tiel bone priskribitan trivoluman Plenan Krestomation. Maskerado ĉirkaŭ la Morto, kiel Teo Ŝvarc titolis sian priskribon de la dua mondmilito en Hungario, ĉion interrompis.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!